

SCIENCA REVUO

Oficiala Organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

Aperas kvaronjare. Abon- plus membro-kotizo: 7 us. dolaroj.

Ĉefredaktoro: *RNDr. Josef Kavka, CSc., Lužná 7, 160 00 PRAHA 6 – Vokovice*
Ĉeĥoslovakio.

Redaktoro de la korp-kultura kajero: *Oldřich Kníchal, Pod Zvonařkou 4,*
120 00 PRAHA – Ĉeĥoslovakio.

Por redakti kaj eldoni tiun ĉi kajeron afake kunlaboris: *Gersi Alfredo Bays.*
Administranto: *Gersi Alfredo Bays, Caixa Postal 49, BR-89800 CHAPECÓ – SC,*
Brazilo.

ESTRARO DE ISAE:

Prezidanto: prof. *Sin'itirō Kawamura, 427-7 Kinasityō, TAKAMATU 760,*
Japanio.

Vicprezidantoj: prof. *Carl Stöp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, OSLO 2,*
Norvegio.

prof. *Paul Edwin Kustaanheimo, Danmarks Tekniske Højskole, 040*
DIA-E, Bygning 451, DK-2800 LYNGBY, Danlando.

Ĝenerala sekretario: *RNDr. Jozek Kavka, CSc.*

Sekretario-kasisto: *RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc., Studentská 7, 160 00,*
PRAHA 6 – Dejvice, Ĉeĥoslovakio.

Aliaj estraranoj: *Dr. Gerhard Kalckhoff, Schuckerstr. 14/XI, D-8000*
MÜNCHEN-70, Germanio (BRD).

prof. *Ing. Vasil Peevski, Gogol 9, BG-1504 SOFIA, Bulgario.*

prof. *Ing. Momčilo Šaponić, Svetog Save 25/I, stan 4, 11000 BEOGRAD,*
Jugoslavio.

doc. *Boris Vladimirović Tokarev, Širokaja 16-200, SU-129224 MOSKVA,*
Sovetio.

Dr. W. A. Verloren van Themaat, direktoro de Informa Centro de ISAE,
Volkerakstraat 38^I, 1078 XT AMSTERDAM, Nederlando.

prof. *Saburo Yamazoe, Iwagami-Machi 4-8-9, MAEBASHI-SHI 371, Gun-*
ma-Ken, Japanio.

Kompostita far INTELESKO – Internacia Elektronika Esperanto-Kompostado.
Presita en Brazilo – *Impresso no Brasil pela*
IMPRIMAX – Rua Cel. Passos Maia, 468 – 89820 XANXERÊ – SC – Brazilo.

SCIENCA REVUO, vol. 29 (1978), n-ro 4 (132)

Internacia terminologia kunlaboro en la sfero de la
korp-edukado kaj la sporto
*Václav Fiala (Ĉeĥoslovakio)**

1. Enkonduko

Unu el la sferoj de la plej intensaj internaciaj kulturaj packontaktoj estas la korp-edukado kaj sporto. La signifo de la sporto por la internacia paca kunekzistado estas ĝenerale konata kaj ŝatata. Milionoj da sportistoj kaj korp-edukaj kompetentuloj en la tuta mondo deziras, ke la paca sporta konkursado por ĉiam anstataŭigu militajn konfliktojn en juste ordigita mondo kaj ke la sporto neniam estu misuzata. Tiujn ĉi ideojn oni ripetas dum ĉiuj grandaj internaciaj sportaj renkontiĝoj, mondĉampionadoj en la plej gravaj sportoj kaj precipe dum olimpikoj. Sendube ĝi estos ankaŭ la ĉefa ideo ĉe la dudekdua olimpiko en Moskvo (1980).

La internacia sporta movado estas tutmonde organizita. La plej popularaj sportoj havas siajn internaciajn federaciojn. Naciaj korp-edukaj kaj sportaj federacioj havas siajn naciajn olimpikajn komitatojn, kiuj estas membroj de Centra Internacia Olimpika Komitato (CIOK). Nature ne temas nur pri internaciaj sportaj aŭ korp-edukaj kontaktoj, sed ankaŭ pri internacia faka, teoria kaj scienca kunlaborado. Ĉe Unesko funkcias Tutmonda Komisiono por Korp-edukado kaj Sporto (CIEPS), kiu gvidas, organizas kaj instigas tiun ĉi kunlaboron. Ĉeĥoslovakion reprezentas en tiu ĉi kunlaboro en organoj de CIEPS Ĉeĥoslovaka Federacio por Korp-edukado kaj Sporto (ČSTV) pere de siaj delegitoj. Intensa kunlaborado evoluas inter la socialismaj landoj.

Tamen ni rigardu la internaciajn kontaktojn el vidpunkto de komunikado. Rektaj internaciaj kontaktoj, simile kiel faka kunlaborado, ekzemple pere de skribaj materialoj kaj literaturo finfine dependas de scipovo de fremdaj lingvoj. En skriba komunikado rolas ekonomiaj eblecoj de la multekosta sistema tradukado. En rekta interparolado gravas aŭ sufiĉa scipovo de uzata lingvo, aŭ tiu de almenaŭ unu el la t.n. "mondlingvoj", uzataj dum internaciaj konferencoj, simpozioj, seminarioj k.t.p. Ankaŭ tiaspeca maniero de tradukado por amasa aŭskultado de pluraj lingvoj estas ege multekosta kaj limigas eblecojn de ĉi tiuj internaciaj kontaktoj kaj kvaliton de la interkomprenado. La kvalito de

* Doktoro de la natursciencoj, kandidato de la pedagogiaj sciencoj, docento pri la teorio kaj metodiko de la korp-edukado (katedro de Pedagogiko ĉe Filozofia Fakultato de Karola Universitato en Prago), prezidanto de Komisiono por Korp-eduka Terminologio.

interkompreniĝo dependas ja de lingvoscia grado de la ĉeestantoj, kiu ne ĉiam respondas al faka nivelo de la koncerna fakulo. Sekve ni renkontas dum internaciaj kunvenoj ofte fakulojn, kiuj regas bone la lingvon, tamen jam ne la temon de la traktado, aŭ male. La nacioj, kies lingvo estas uzata kiel interkomunikilo, ofte ne kapablas eĉ imagi, kian handikapon havas dum reciprokaj komunikadoj la alinacioj, kiuj estas devigitaj regi fremdan lingvon. Tio postulas multe da tempo, kiun oni ne povas dediĉi al plialtigado de sia faka nivelo. Estas certe klare, ke tio kondukas al sento de supereco de unuaj kaj la malsupereco de aliaj.

Bazo de la faka kaj scienca komunikado estas **faka dokumentado**. Dokumentadon pri la literaturo de sia propra fako faras kutime en certa grado ĉiu fakulo aŭ scienculo mem, aŭ oni tion por li faras ĉe lia laborejo. Tamen rilate al senĉese kreskanta kvanto da faka literaturo en ĉiu konsiderinde granda fako, nur nemultaj povas plu procedi tiamaniere kaj oni devas serĉi helpon ĉe fakaj centroj de dokumentado, kiuj estiĝas nur malfacile. Same malfacile eblas subteni ilian funkciadon. En la sfero de la korp-edukado kaj sporto ekzistas (en la ĉeĥa lingvo) du tiaj centroj en Prago, t.e. Centra Korp-eduka Biblioteko ĉe la Fakultato de Korp-edukado kaj Sporto ĉe Universitato de Karolo (*Ústřední tělovýchovná knihovna při fakultě tělesné výchovy a sportu při Univerzitě Karlově*) kaj Informa kaj Dokumentada Centro de ČÚV ČSTV (*Český ústřední výbor Československého svazu tělesné výchovy*), kiuj havas relative viglan interŝanĝan komunikadon kun eksterlandaj laborejoj kaj centroj de dokumentado. En Slovakio funkcias Centro por Studado kaj Informoj de FTVŠ UK (*Študijné a informačné stredisko FTVŠ UK*). Ĉe CIEPS oni starigis jam antaŭ dek jaroj la t.n. Internacian Oficon por Dokumentado kaj Informoj (*BIDI*), kiun en 1974 oni transformis al Internacia Asocio por Sportaj Informoj (IASI). Oni senĉese klopodas pli bone koncentri internacian dokumentadon en la sfero de la korp-edukado kaj sporto, pli bone kaj efike klasadi senĉese amasiĝantajn informojn kaj ellabori fakan t.n. "trezoron", bazitan sur la scienca klasado de la informoj. La plej aktivaj estas en tiu ĉi sfero fakuloj el okcidentaj, germane parolantaj landoj (Aŭstrio, FRG, Svisio).

Ajna dokumentado de informoj havas sian fundamentan problemon en sistemo de klasado. Krom la ĝenerala aboca klasado laŭ aŭtoroj estas ankaŭ necese klasi, se la kvanto da informoj estas granda, konforme al iu laŭobjekta sistemo de koncerna fako. Klopodoj de dokumentistoj pri ellaborado de dokumentada sistemo direktiĝas kutime al la celo, klarigi kaj difini terminojn kaj nociojn. Oni eliras dedukte de bazaj nocioj (kategorioj – deskriptoroj), kiujn oni konkretigas en subordigitaj terminoj laŭ ilia ĝeneraleco, ĝis konkretaj terminoj. Tio nature premisas, ke la bazaj nocioj estu senriproĉaj.

Tiu ĉi sistemo surbaze de fakterminoj-nocioj subordigitaj kaj superordigitaj ja komplikigigas, ĉar unuopaj fakoj ofte ne havas ellaboritan teorion, ĉar la praktiko estas ofte pli komplika ol oni komence opiniis kaj ankaŭ sekve de tio, ke la fakoj senĉese ŝanĝiĝas. El tio rezultas, ke la sistemeca dokumentado estas

strikte ligita al nivelo de koncerna teorio kaj ĝi povas esti nur tiom valora, kiom estas la teorio. Sekve estas necese plibonigadi unuecan teorion de koncerna fako, t.e. en nia okazo la teorion de la korp-edukado. La sistemoj, kiuj eliras el la terminologio kaj dokumentado povas tre helpadi almenaŭ tiel, ke ili atentigas pri malakordoj en opinioj de aŭtoroj kaj fakuloj rilate al iuj problemoj.

La internaciaj interkomunikadoj senĉese montras, ke en diversaj landoj estas nek la dokumentado, nek la teorio de la korp-edukado egalnivele evoluintaj. Tio malplifaciligas disvastigon de la informoj kaj spertoj. Krome malhelpas subjektivaj kaj ekonomiaj malfacilaĵoj, kiel ni jam diris. Tamen ekzistas ankoraŭ **malfacilaĵoj objektivaj, kiujn estigas la lingvoj mem**.

En ĉiu evoluinta fako oni uzadas multe da komunaj internacie kompreneblaj terminoj, kiuj devenas kutime el la greka kaj latina lingvoj aŭ el la lingvo, en kiu la fako estiĝis aŭ kie ĝi estas plej progresinta. Krome, ĉiu lingvo posedas multe da terminoj, laŭkutime uzataj nomoj kaj idiotismoj, laŭvorte netraduk-eblaj aŭ tre malfacile tradukeblaj. La termino eĉ povas havi en du lingvoj diversajn signifojn; tio estas por tradukado la plej ĝena okazo. Laŭvortaj tradukoj faris jam multajn konfuzojn. Tio estas konata al ĉiu sciencisto, tradukisto kaj al ĉiu, kiu regas bone iun fremdan lingvon. Montriĝas, ke **ĉiu nacio ne nur alie parolas, sed iugrade eĉ alie pensas**. En ĉi okazoj estas necese serĉadi ekvivalentojn por reala senco de koncernaj vortoj, eldirojn aŭ priskribojn, kiuj esprimus kaj klarigus precize la samon en cellingvo. Evidentas, ke internacia terminologia kunlaborado en la sfero de la korp-edukado kaj sporto estas necesa.

2. Kion ni komprenas sub la terminologia kunlaboro?

La termino estas preciza kaj unusignifa faka nomo por nocio aŭ aĵo en certa praktika aŭ scienca fako. La aro el ĉiuj fakaj nomoj en la korp-edukado kaj la sporto konsistigas la **fakan korp-edukan terminologion** (*K. SOCHOR 1955, V. FIALA 1976*). La terminologia laboro laŭ nia koncepto estas klopodo normigi tiun ĉi terminologion.

La korp-eduka terminologio estas ampleksa kaj tre komplika sistemo, kiu konsistas el multe da ampleksaj nesimplaj subsistemoj. Oni distingas antaŭ ĉio grupojn de specialaj fakterminologioj laŭ korp-edukaj aŭ sportaj disciplinoj, ekzemple la terminologion de la piedpildko, atletiko, gimnastiko, naĝo, skermo, turismo, danco k.t.p. Tiuj ĉi grupoj interrilatas. Tamen la sportaj terminologioj evoluadis aparte unu de la alia, sekve ili entenas multajn malakordojn. Estiĝis multaj terminoj komunaj, kiuj ja havas en diversaj sportoj malsamajn signifojn. Aŭ kontraŭe, la samaj movoj havas malsamajn nomojn. En iuj fakoj ekzistas bonaj terminologioj, sed en la aliaj la terminologioj ne estas sufiĉe altnivelaj, oni uzadas fremdajn vortojn, terminojn nekorektajn aŭ slangajn. Tio ja komplikas interkomprenon de unuopaj fakoj kaj la internacian. Estas necese forigadi la malakordojn kaj unuigi la terminologion.

Laŭ la enhavo de la korp-eduka terminologio ni distingas la nomojn kaj nociojn ĝeneralajn, organizajn, metodikajn, la nomojn por konkreta agado, materialaj necesajoj k.t.p. La plej grandan grupon en ĉiu fako prezentas la **terminologio de korp-ekzercoj**, movoj kaj kompleksaj movoj. En Ĉeĥoslovakio havas longjaran tradicion “*Tyršovo tělocvičné názvosloví (gymnastické)*” (Korp-ekzerca terminologio de Tyrš – gimnastika). Oni kreis ĝin por bezonoj de la sokola* organizo. Unue ĝi estis eldonita en 1872. Ĝi estas logike kaj sistemece aranĝita kaj plejparte ĝis nun uzata.

Por klarigi, kio estas logika kaj sistemece aranĝo de terminologio kaj kio estas semantika precizeco kaj unusignifeco de faka termino, ni devas reveni al **dialektika rilato inter la faka termino, nocio kaj reala fenomeno**, kiuj estigas la t.n. semantikan referencan triangulon.

Simple dirite, ekzistas esence du specoj de la terminoj: la **markaj** kaj la **sistemecej**. La marka termino estas ajna elpensita vorta signo, kiu ne eliras el reala fenomeno, kiun ĝi priskribas. Tio estas ekzemple iuj t.n. **imitaj nomoj**, ekzemple en naĝo la t.n. “papili-naĝo”. Ĉi tie temas pri tute supraĵa simbola komparo de movoj fare de naĝanto kun la flugmovoj de papilio, kiuj reale havas nenion komunan. Al laiko tiu ĉi nomo diras nenion.

Kontraŭe, sistemece termino eliras el esenco kaj interrilato de realaj aĵoj (objektoj), agadoj aŭ fenomenoj. Do ekzemple, la termino “rektmanfrapo” (*J. NOVÁK, I. ŠPIČKA* 1978) eliras el pli ĝenerala termino (supera) “manfrapo”, kiun oni specifas per la vorto “rekta”, montranta, kiamaniere oni la manfrapon faras. Eĉ laiko povas esence laŭ tiu ĉi specifo distingi la rektmanfrapon disde aliaj frapoj. En la praktiko oni la duvortan terminon kunigas kaj estiĝas la unuvorta: rektmanfrapo.

En la ĉeĥa kaj la slovaka korp-edukaj terminologioj oni jam tradicie klopodas pri ilia sistemececo. En iuj lingvoj estas pli kutimaj, speciale en la sporto, ne tro kompreneblaj markaj terminologioj.

Plue estas necese distingi diversan nivelon de ĝeneraleco de la termino, kiu estas esprimita per vorto. Antaŭ ĉio estas necese distingi nomojn – per kiuj oni esprimas unikan, konkretan objekton, senteblan per sensoroj – disde la nomoj ĝeneralaj. Do ekzemple, la nomo “ludkampo de (klubo) Sparta en Prago” estas unika kaj unusignifa nomo, la nomo “ludkampo” estas termino ĝenerala, kaj ĝi esprimas ĝeneralan nocion “ludkampo”. Absoluta plejparto de la fakaj terminoj esprimas nociojn en diversa nivelo de ĝeneraleco kaj abstrakteco.

La nocioj estas ideo-bildoj de esencaj ecoj de realaj aferoj. Ili entenas en si nur komunajn esencajn signojn de multaj aferoj. Ili estiĝas per indukto en homa praktiko pere de la parolo kaj kapablo logike pensi. Ilia signifo estas en tio, ke ili plifaciligas per dedukta vojo konatiĝi ankaŭ kun aliaj aferoj (fenomenoj), kiuj apartenas al ilia enhavo. Do ekzemple, konatiĝo kun unuopaj arboj

* *Sokol* estis ĉeĥa korp-eduka organizo, fondita en 1862 de *M. Tyrš*.

kaj estigo de ĝenerala nocio “arbo” ebligas ekkoni facile ĉiujn arbojn, kiujn oni ankoraŭ ne konas.

Pli ĝeneralaj nocioj entenas en si la nociojn subordigitajn kaj faras kun ili logikan sistemon. La logika sistemo de la nocioj estiĝis tial, ĉar ĝi spegulas la realecon, kiu estas ankaŭ sistema. Sekve al la sistemo de la nocioj rilatu ankaŭ la sistemo de la terminoj, kio en la praktiko ofte ne estas plenumita.

Ĉiu faka nocio, kaj speciale la nocio scienca, estu klarigita per la t.n. **esenca difino**, kiu diras, al kiu plej proksima pli supera nocio la fenomeno apartenas, kaj havas ĉiujn ĝiajn fundamentajn, t.e. neneglekteblajn signojn, tamen nur tiujn ĉi. Tio validas ankaŭ por tiuj fakaj terminoj, per kiuj oni la nociojn signas.

Hierarĥio de nocioj kaj terminoj en evoluinta fako, kiel ekzemple la korp-edukado kaj la sporto, kondukas kutime al la t.n. **fundamentaj nocioj, do kategorioj**. Klarigo de la fundamentaj nocioj en ĉiu fako estas la celo, rezulto kaj sukceso de bona, longdaŭra faka scienca laboro kaj ne ĉiu fako atingas ilin. Ne mirindas do, ke eĉ en la korp-edukado kaj sporto ne estas ĝis nun la fundamentaj nocioj unuece klarigataj kaj difinitaj.

La fakaj terminoj estiĝas komplike, ne ĉiam laŭregule kaj korekte. Ili estiĝas antaŭ ĉio en la praktiko kune kun la nocioj. Tamen ne ĉiam oni sukcesas derivi la nomon de la plej grava afero, do de ties esenco. La terminoj estiĝas ankaŭ per adapto de fremdlingvaj vortoj, de kie oni prenis ankaŭ la konon de la afero, aŭ el hazarda simileco de vortoj aŭ aferoj, aŭ per ŝanĝado de la senco de la jam ekzistantaj vivantaj vortoj, el vortoj slangaj k.t.p. Estas konate, ke multaj aferoj havas kelke da nomoj samsencaj (sinonimoj) aŭ unu vorto esprimas kelke da nocioj (homonimoj). Kreado de fakaj terminoj kaj taksado de ilia korekteco okazas laŭ firmaj reguloj. Enradikiĝantan kaj neĝustan nomon oni povas anstataŭigi malfacile.

La ĉeĥan korp-edukan kaj sportan terminologion normigas en Ĉeĥoslovakio t.n. Komisiono por Korp-eduka Terminologia (*Komise pro tělovýchovné názvosloví*) ĉe Metodika Konsilio (*Metodická rada*) de ČŮV ČSTV. Ĝi lingve kunlaboras kun Instituto por la Ĉeĥa Lingvo (*Ústav pro jazyk český*) de ČSAV (Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj).

Normigo de terminologio, kiel estis jam aludite, ne estas nur praktika korektado de unuopaj terminoj aŭ terminologia ordigo en unuopaj fakoj. Antaŭ ĉio oni devas solvi multajn ĝenerale teoriajn problemojn. Ĉiu termino havas du aspektojn: la materian kaj la lingvan. El la materia vidpunkto ĉiu termino eliru el la esenco de la afero. Ĉiu afero apartenas al io kaj rilatas al iu sistemo. Sekve estas necese konstruadi sistemeceajn terminologiojn, kiuj respondas al la sistemo de aferoj. El la lingva vidpunkto la faka termino devas obei regulojn kaj leĝojn de la norma lingvo, kies ero ĝi estas.

La normigo de la korp-eduka aŭ de la sporta terminologio estas do antaŭ ĉio longdaŭra korp-eduk-teoria kaj lingvistika laboro kaj ĉiufanka klopodo pri unuigo de la traktata terminologio. Tiamaniere povas estiĝi kompletaj terminologiaj sistemoj kaj normoj validaj relative longan tempon. Tamen tiuj ĉi normoj postulas oficialigon kaj lanĉon per koncerna aŭtoritateco.

3. Principoj de zorgado pri korp-eduka terminologio

Enkadre de Komisiono por la Korp-eduka Terminologio estis surbaze de longjara laboro formulitaj jenaj ĉefprincipoj de zorgado pri la korp-eduka terminologio:

3.1. Respekti la norman lingvon

Korekta faka termino estas ero de la norma lingvo. Sekve la nenormaj (slangaj aŭ jargonaj) vortoj, kiuj estiĝas en la praktiko (plejparte en la sporto), estu ekstermitaj. Parolado en la norma lingvo eĉ en la sporto ne estas esprimo de troigita naciismo aŭ snobismo, sed de la estimo al gepatra lingvo. La fremdaj terminoj estu uzataj nur tiam, kiam tio bezonas faka kaj scienca laboro, por ke la faka lingvo estu komprenebla por plejparto de la korp-edukaj fakuloj.

3.2. Krei sistemecajn terminologiojn

Aferoj kaj fenomenoj, kiel estis jam dirite, interrilatas reciproke, ili kreas grupojn kaj sistemojn. Sekve ankaŭ la fakaj terminoj faru laŭeble koherajn tutojn. La nocio, kiun oni per la termino esprimas, estu ĝuste difinita. Ankaŭ la terminoj estu kreitaj laŭ logikaj reguloj. Estas necese distingadi la terminojn sistemecajn kaj la markajn. Oni kreu laŭeble la sistemecan terminologion, kiu estas komprenebla eĉ al laikoj.

3.3. La termino rilatu al la esenco de la afero

Terminologio ne estas beletro. Ĝi esprimu racionalan aspekton de aferoj kaj rilatu al iliaj plej gravaj signoj. La esenco de la afero ne estas ĉiam konata. Ĝi rezultas el scienca studado. La terminoj, derivitaj de flankaj (laŭaperaj) signoj, estas iluziaj. La termino ne estas nura konvencio, ne estas nura vinjeto.

3.4. La termino estu unusignifa

La termino karakterizu sian enhavon, kiu estu precize difinita. Estas necese evitadi plursignifecon de la vortoj (homonimoj). La difino de la nocio rilatas

ankaŭ al la koncerna termino, ĝi estas ties esprimo.

3.5. La termino estu kiel eble konciza

La praktiko postulas koncizecon, t.e. laŭeble unuvortajn terminojn, ĝi emas kurtigadi ilin. Tamen tiamaniere estiĝas iam kaj tiam nenormaj esprimoj. La principo de la koncizeco kolizias kun tiu de sistemeco (3.2); sistemece derivitaj terminoj estas ofte plurvortaj. Estas necese defendadi principon de sistemeca kaj komprenebla terminologio, sed dume ne sencele bremsadi naturan evoluon de la faka lingvo al koncizeco.

Tiuj ĉi principoj de zorgado pri la korp-eduka terminologio validas ĝenerale. Oni povas apliki ilin ankaŭ en aliaj lingvoj. Memkomprene oni devas adapti ilin laŭ la reguloj de unuopaj lingvoj.

Enkadre de Komisiono por Korp-eduka Terminologio de VMR* ČŪV ČSTV estis solvitaj ankaŭ aliaj scienc-praktikaj problemoj, t.e. unueca baza terminologio de la korp-ekzercoj. Normigante terminologion de unuopaj korp-edukaj kaj sportaj fakoj, oni sciis jam de longe, ke por priskribi diversajn korp-ekzercojn en unuopaj sportoj, oni uzadas iujn terminojn el gimnastiko kaj ke tio estas necesa. Tiamaniere estiĝis hipotezo, ke ekzistas baza komuna sistemo de la terminoj de la korp-ekzercoj, necesa por ĉiuj korp-edukaj kaj sportaj branĉoj. Tiu ĉi sistemo estis detale prilaborita en la ĉeĥa lingvo post pli ol dudekjara laboro kaj science prifendita ĉe la fakultato de korp-edukado kaj sporto de UK kaj en 1971 eldonita kiel normiga unuigita baza terminologio de korp-ekzercoj por ĉiuj sferoj de la korp-edukado kaj sporto en la ĉeĥa parto de ĈSSR.

Baza terminologio de korp-ekzercoj estas kohera sistemo de fakaj terminoj por ĉiuj simplaj movoj de la homa korpo aŭ de ĝiaj partoj, kiuj estis difinitaj surbaze de analizo de anatomia strukturo de la homa korpo kaj de ĝiaj spacaj rilatoj.

La baza terminologio de la korp-ekzercoj estas ĝenerale valida kaj logika sistemo, kiun oni povas traduki kiel sistemon en ĉiun evoluantan lingvon, eventuale post necesaj adaptoj. En ĝi estas solvitaj jenaj problemoj, kiuj troviĝas en ĉiu korp-edukado aŭ sporto ie ajn:

- entenas ĉiujn imageblajn simplajn movojn de la homa korpo aŭ de ĝiaj partoj;
- distingas la movojn de la tuta korpo kaj de la partoj de la korpo, kiuj esence diferencas;
- distingas inter la movoj kaj la pozicioj kaj rilatoj inter ili, kio estas unu el la plej grandaj problemoj de ĉiu terminologio;
- solvas komplekse ekregon de la spaco kaj determinon de movoj kaj pozicioj en la spaco aŭ rilate al bazo (pri tio vane klopodis jam multaj

* Vědecko – metodická rada = Scienc-metodika Konsilio.

corp-edukaj sistemoj).

La baza terminologio de la korp-ekzercoj ne kontraŭstaras la unuopajn specialajn terminologiojn de diversaj korp-edukaj fakoj kaj sportoj (se ili ne entenas gravajn erarojn). Kontraŭe, ĝi helpas al unuopaj specialaj terminologioj detale priskribi eĉ aliajn movojn ol la korp-ekzercojn, ekzemple la labormovojn.

Komisiono por Korp-eduka Terminologio ĉe Scienca Konsilio de ĈŪV ĈSTV partoprenas la internacian terminologian kunlaboron jam ekde la unuaj internaciaj seminarioj en *Strobl* (1963) kaj en *Gauting* (1965), kiujn inspiris la germane parolantaj landoj. Dum 1967 estis starigita ĉe *BIDI* Internacia Terminologia Komisiono konsekvence de tio, ke kunlaborado en dokumentado estis malhelpata de gravaj terminologiaj problemoj. Oni organizis vicon da internaciaj terminologiaj seminarioj (1967, Bukareŝto; 1968, *Zeist* kaj *Maggingen*; 1969, *Snagov*; 1972, *Graz*; kaj la lasta, 1972, en Prago). La ĉefan atenton oni dediĉis ekde la komenco al fundamentaj nocioj (kategorioj) de la korp-edukado kaj sporto, al la nocioj kiel "movo", "trejnado" k.t.p. En ĉiuj kunvenoj nia komisiono tre vigle partoprenis.

Dum internaciaj terminologiaj renkontiĝoj oni akiradis multajn valorajn spertojn por la plua terminologia kunlaborado. Montriĝis, ke terminologiajn problemojn en la sfero de la korp-edukado kaj la sporto oni solvas praktike en ĉiuj partoprenantaj landoj kaj en ĉiuj lingvoj. Antaŭ ĉio instruado pri la teorio de la korp-edukado en superaj lernejoj bezonas klare difini la terminojn kaj la nociojn. Tamen ne en ĉiuj landoj estas la laboro unuece direktita kiel en Ĉeĥoslovakio. La plej altnivelajn rezultojn oni akiris en la germana lingvo, kie la laboro estas farata eĉ ekster *CIEPS*, speciale en la t.n. *Interterm*, kies centro estas en Vieno. Tre bonajn rezultojn oni akiris ankaŭ en Rumanio, kie oni eldonis en 1974 seslingvan korp-edukan vortaron. En iuj landoj oni starigis terminologiajn komisionojn laŭ nia modelo.

Por nia plua terminologia laboro estis tre signifoplena la lasta terminologia seminario enkadre de *BIDI*, kiu okazis en 1972 sub aŭspicio de Scienca Konsilio de ŪV ĈSTV en Prago. Ĝin partoprenis delegitoj el la socialismaj landoj, unuafoje ankaŭ el Sovetio, kaj la estraro de *BIDI*. En tiu ĉi seminario oni akceptis niajn proponojn de la supre enkondukitaj principoj de flegado pri la korp-eduka terminologio. Denove montriĝis, kiel grava estas por la internacia kunlaborado propra terminologia laboro kaj normigo de la korp-eduka terminologio en ĉiu lingvo. En la seminario oni iniciatis ĝian pluan intensigon.

Ankaŭ konfirmiĝis, ke pli ĝeneralaj korp-edukaj terminoj kaj nocioj, precipe la bazaj nocioj, entenas fortajn ideologiajn aspektojn, kiel montriĝis jam dum antaŭaj seminarioj. Do, ekzemple, apenaŭ estus eble atingi unuecan difinon de la korp-edukado en la germana lingvo inter fakuloj en GDR kaj FRG, se eĉ la nomoj ne povis esti la samaj (*Körpererziehung* / *Leibeserziehung*); tamen oni konstatis, por ebligi interkompreniĝon, ke ili estas egalaj. La ideologian

enhavon de ĝeneralaj terminoj oni ja ne povas eskludi.

En ambaŭ lastaj seminarioj de *BIDI* oni estis tre interesata pri la baza terminologio de la korp-ekzercoj. Traduki tiun ĉi terminologion en aliajn lingvojn, kiuj ĝis nun ne havas disvolvitajn sistemecajn terminologiojn kiel en la ĉeĥa aŭ slovaka lingvoj, verŝajne estos malfacile. Tamen tiun ĉi evoluon oni povus ja plifaciligi. Ni supozu, ke la baza terminologio de la korp-ekzercoj estus ekzemple germanigita, kaj nur poste, pere de la germana lingvo, tradukita ekzemple en la hungaran, rumanan k.a. lingvojn. Kiom da neprecizecoj povus dume amasiĝi nur pro la objektiva lingva diverseco! Ĉi-loke ŝajnas esti unika oportuno esperantigi tiun ĉi sistemecan terminologion kaj plue pere de Esperanto laŭbezone traduki ĝin en ajnan alian lingvon. Esperanto rilate al siaj ecoj povus certigi maksimume precizan transdonon de la informoj.

Nian rezonadon pri la internacia terminologia kunlaborado en la korp-edukado kaj sporto ni ne povas fini sen bedaŭro, ke dum transformiĝo de *BIDI* al IASI en 1974 oni ne plu starigis la specialan komisionon por la terminologio. Provizore oni solvas estiĝintajn terminologiajn problemojn enkadre de la dokumentistiko. Tamen ni eble sufiĉe aludis, ke plua internacia speciala terminologia kunlaborado tre prosperigus la mondajn internaciajn kontaktojn en la sfero de la korp-edukado kaj la sporto.

4. Referencoj

- BERNETT, H. (1966): *Zum Begriff der Bewegung*. — Ahrensburg.
FIALA, V. (1976): *Seminář o otázkách pojmů a terminologie tělesné výchovy s mezinárodní účastí*. — Praha.
FIALA, V. (1971): *Základní názvosloví tělesných cvičení*. — Praha.
NICU, A. (1974): *Terminologia educativei fizice si sportului*. — București.
NOVÁK, J. — ŠPIČKA, I. (1978): Dek du ĉapitroj pri la sindefendo. — Starto, ĈEA, n-roj 1-6. — Praha.
SOCHOR, K. (1955): *Příručka o českém názvosloví*. — ČSAV, Praha.
TSCHERNE, F. (1971): *Fachbegriffe*. — Bern.
TSCHERNE, F. (1964): *Zur Terminologie der Leibesübungen*. — Wien.

Mezinárodní terminologická spolupráce v oblasti tělesné výchovy a sportu

Tělesná výchova a sport je oblast intenzivního mezinárodního styku, sport je celosvětově organizován. Mezinárodní spolupráce je však bržděna, zejména v teorii a dokumentaristice tím, že tělovýchovná terminologie je nejednotná. Každý národ nejen jinak mluví, ale i poněkud jinak myslí. Překládání z jednoho jazyka do druhého je obtížné a při mezinárodních konferencích velmi drahé a nedokonalé. Nejvíce jsou postiženi příslušníci malých národů, kteří se musí naučit tzv. jednacím mezinárodním jazykům. Je proto třeba, aby v každém jazyce byla tělovýchovná terminologie normalizována podle uvedených zásad a aby

pokračova mezinárodní terminologická spolupráce, která byla začata v CIEPS UNESCO. V češtině je základní názvosloví tělesných cvičení normalizováno podle teoretického systému, který je všeobecně platný pro všechny jazyky. Pro přesný mezinárodní přenos informací by se nejlépe hodilo esperanto, které je založeno výhradně na věcné ekvivalentní srozumitelnosti.

ESPERANTA MECIDINA TERMINARO

aperis kiel stencilita eldonaĵo de MEDICINISTA SEKCIO DE Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ĝia aŭtoro, d-ro *Josef Hradil*, CS-295 01 MNICHOVO HRA-DIŠTĚ, Ĉeĥoslovakio, skribas en sia enkonduko i.a., ke d-ro *Zamenhof* ne trovis tempon por verki siafakan vortaron en Esperanto; ke la medicina vortaro de d-ro *Maurice Briquet* entenas 3 675 radikojn; ke d-ro *André Albault* *Maurice Briquet* entenas 3 675 radikojn; ke d-ro *André Albault* kompilis terminaron, kiu inkludiĝas en PLENA ILUSTRITA VORTARO.

La terminaro de d-ro *Hradil* enhavas ĉirkaŭ 3 000 radikojn, inter ili kelkajn plej modernajn. Ĝi prezentas freŝdatan helpilon por aŭtoroj, redaktoroj kaj vortaristoj de la medicinaj fakoj.

Estas dezirinde, ke interesatoj mendu la terminaron ĉe:

Ĉeĥa Esperanto-Asocio
Jilská 10
SC-110 00 PRAHA 1 – Staré Město
Ĉeĥoslovakio

Kunlaboremuloj kontaktiĝu kun d-ro *Hradil*.

INTELESKO

INTERNACIA ELEKTRONIKA ESPERANTO-KOMPOSTADO

Je la servo de la Esperantistaj eldonejoj de la tuta mondo

La frapoj kaj ilia strukturo (I)

*Jindřich Novák – Ivan Špička (Ĉeĥoslovakio)**

1. Kio estas la frapo

Sub la termino “frapo” en vasta senco de la vorto ni komprenas en la batalagologio (*J. NOVÁK – I. ŠPIČKA* 1977) iun ajn batalagon (uzatan por sendanĝerigi kontraŭulon), ĉe kiu la kineta energio de iu objekto (armilo, parto de la homa korpo aŭ la homa korpo kiel la tuto), efikante la korpon de la kontraŭulo, ŝanĝiĝas al misforma laboro. En malvasta senco de la vorto ni nomas “frapo” ankaŭ iun ajn imitaĵon de la frapo (en la supre menciita senco), uzatan dum ekzercado aŭ en la sporto. En la plua klarigo ĉiam estos el la kunteksto klare, en kiu senco ni uzas la terminon “frapo”.

Ajna frapo estas nur parto de pli ampleksa tuto, la t.n. **frapatako**. La frapatako en ĝenerala okazo konsistas el:

- atingo de optimuma psiĥa stato de la fraponto por realigi frapon (mensa parto de la solvo de situacio);
- kreado de kondiĉoj, en kiuj estas minimuma probablo, ke la frapanto suferos malvenkon dum sia atako (taktiko de la batalo);
- tehniko parto de realigo de la frapatako (do la frapo).

En tiu ĉi verko ni okupiĝas antaŭ ĉio pri la tehniko parto de realigo de la frapatakoj, nome el **formale-biomeĥanika** vidpunkto.

La tehniko parto de la realigo de la frapatako konsistas el jenaj fazoj:

- translokiĝo de fraponto en starpozicion oportunan por frapi (t.n. **enstariĝo**);
- translokiĝo de la batonta membro en pozicion, kie ĝi estas preta senpere frapi (t.n. **enpretumigo de membro**)**;
- atingo de optimuma distanco disde frapcelo (t.n. **aldistanciĝo**);
- atingo de oportuna pozicio rilate al frapcelo (t.n. **enpoziciĝo**) kaj
- la frapo.

La unuajn kvar fazojn de la frapatako ni nomas **prefrapo**.

Se ni uzadas armilojn (**pugneon**, **tranĉilon**, **bastoneton**, **bastonon**, **longan**

* Inĝenieroj.

** Sencon de ĉiuj terminoj, kiuj ne estas enkondukitaj en literaturo (*J. NOVÁK – I. ŠPIČKA* 1977, 1978, *G. WARINGHIEN* kaj kol. 1970, *T. UJLAKY-NAGY* 1972) aŭ kies difinojn ni ŝanĝis, v. en la vortareto je la fino de tiu ĉi artikolo. Memkomprene tiuj ĉi terminoj aŭ ŝanĝoj estas nur proponitaj.